

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

✧ dumonata kristana revuo en esperanto ✧ N- ro 5 (830) 2001 ✧

TRIOPO EN ZAGREBO



Foto: E. Kaszab

La redaktoro diskutas kun du el la motoroj de la Diservo—libro ADORU. De maldekstre: Philippe COUSSON, Adolf BURKHARDT, Bernhardt EICHKORN.

**Fino de la Epistolo al la Romanoj
Ekumenismo
Esperanto—movado
Nia Ligo**

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala,
kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la
Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Jacques TUINDER

✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerk
☎ +31 251 231941; ✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen
a/d Rijn, Nederlando; ☎ +31 1724 20222;
✉ j.a.van.dijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn,
Germanio; ☎ +49 7131 162688; ✉ keli.@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto,
minimume €15,- ☉ Membro-subtenanto €22,-
☉ Nura abono: pagante rekte al KELI €12,-
☉ pagante al Libroservo €14,- Sendoj de
okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la
kasisto de KELI ☉ Se estas en via lando UEA—
poŝtĝironto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu
prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI
☉ Nederlanda poŝtĝironto de KELI: 5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altern.com.

Abonprezo sen membreco en KELI: €12,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al
la kaso de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas
nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko
permesataj, kondiĉe, ke oni citas la fonton.
Specimenon kun represo aŭ traduko oni
sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo **hejme** Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
☎ +48 32 763 37 13; ✉ k.leja@inetia.pl

ENHAVTABELO

- 99 **Romanoj ĉapitroj 9 ĝis 16**
Fino de la nova traduko de Gerrit
BERVELING
- 109 **Ĉu spiritlegajemuloj aŭ
bagateligĉasemuloj?**
Reago al tiu traduko, de Armando
ZECCHIN
- 111 **Ekumenismo...**
Raporto pri diskutoj en trajno de
Armando ZECCHIN
- 117 **Datoj por via kalendaro kaj
diversaj informoj**
- 120 **Mi estas ŝafo en ŝafaro**
Kiel konduti kun sia pastoro de
Yoan F. CUEVAS PEREZ

REDAKTORAJ VORTOJ

Karaj gefratoj en Kristo,
antaŭ unu monato, kelkaj homoj de-
cidis oferi sian vivon, ne por la vivo de
aliaj, sed por ilia morto. Tio multe ŝokis
nin ĉiujn. Kaj ili tion faris ŝajne pro
Dio. Sed ĉu ĉi tiu dio, al kiu ili kredis,
estas nia Dio de amo, kiu ne volas ke
la pekinto mortu, sed ke li konvertiĝu
kaj vivu?

Apud ni vivas ankaŭ aliaj homoj, kies
religio estas teorie la sama kiel tiu de la
morto-donantoj. Aŭskultu ilin. Ili diras,
ke tiu ilia religio estas religio de vivo
kaj ne de morto.

Kun niaj kunhomoj, nin ne nur apud-
vivu, sed kunvivu. Sen perdi nian fidon
kaj esperon, la amo al ili postulas aŭ-
skultadon, diskuton, interŝanĝon.

Tro frue por havi reagojn, pensojn de
vi pri tiu afero. Sed mi esperas ricevi
ilin, ankaŭ pri la reago militista.

Ĝis

Philippe COUSSON

AL LA ROMANOJ

Nova traduko de Gerrit BERVELING

9: 1 Mi diras la veron en Mesio, mi ne mensogas, mia konscienco
garantias ĝin al mi en la sankta Spirito: 2 en mia koro estas granda
tristo kaj senhalta ĉagreno. 3 Vere, mi dezirus ke mi mem estu
malbenita kaj disigita de Mesio, se per tio mi povus helpi miajn
gefratojn, miajn fizikajn parencojn, 4 mi celas la Izraelidojn. Al
ili apartenas esti infanoj <de Dio>, <al ili apartenas> la gloro, la
interligoj, la Torao, la adorado, kaj la promesoj <de Dio>; 5 al ili
<apartenas> la patriarkoj, kaj el ili fizike devenas Mesio, kiu estas
Dio, supera al ĉio, kaj laŭdata por eterne! Amen.

Dio fidelas je Sia parolo

6 Tamen, la Dia parolo ne eraris. Ĉar ne ĉiuj devenaj de Izrael
<apartenas al> Izrael, 7 kaj ne ĉiuj estas Abrahamidoj, ĉar ili
devenas de Abraham. Sed nur kiu devenas de Izaak, kalkuliĝos
kiel viaj idoj. 8 Tio signifas: ne la fizikaj infanoj estas infanoj de
Dio, sed la idoj de l' promeso konsideriĝas kiel posteuloj. 9 Ĉar
promeso estis la diro: *Sekvajare ĉirkaŭ ĉi tempo, Mi revenos,
kaj tiam Sara havos filon.* 10 Kaj ne nur ŝi: ĉar gravedis ankaŭ
Rebeka de unu sola viro, nia patro Izaak. 11-12 Kaj jam antaŭ ol
tiu²¹ naskiĝis aŭ faris ion bonan aŭ malbonan, estis dirite al ŝi: *La
pli aĝa sklavos al la pli juna.* El tio montriĝas, ke validas nur la
decido de l' Dia elekto, sendepende de la homaj agoj, nur depende
de Tiu kiu vokas. 13 Estas ja skribite: *Jakobon Mi ekamis, sed
Esavon Mi malamis.*

Dio agas juste

14 Ĉu el tio ni konkludu ke Dio agas maljuste? Nepre ne! 15 Al
Moseo Li diris: *Gracon Mi donas al kiu Mi volas, kaj Mi kompatos
pri tiuj, kiujn Mi volas.* 16 Do ne dependas de volo aŭ klopodo de
homo, sed de Dia kompato. 17 Al Faraono la Skribo diras: *Tial Mi
igis vin ekstari por montri en vi Mian potencon kaj por konatigi
Mian nomon tra la tuta mondo.* 18 Li do kompatas pri tiuj, kiujn
Li volas, kaj Li obstinigas kiun Li volas.

Dio liberas en Sia elekto

19 Nun vi diros: Kion Li do riproĉu? Ĉar kiu povas kontraŭi Lian
volon? 20 Ho homo, kiu vi estas, ke vi kontraŭdiru Dion? Ĉu la
statuo dirus al la muldinto: *Kial vi faris min tia?* 21 Komprenoble

²¹ Temas pri Esav kaj
Jakob.

la potisto plenrajte povas fari el unu sama bulo ion valoran aŭ ion por ĉiutaga uzado. 22 Kaj se do Dio, por montri Sian koleron kaj por konigi Sian potencon, la objektojn de tiu kolero, pretajn por neniigo, pacience toleris, 23 ĝuste kun la celo malkaŝi la riĉon de Sia gloro al tiuj kiuj estas la objekto de Lia kompato, al tiuj, kiujn Li destinis al gloro ...?22

24 La objekto de Lia kompato estas ni, kiujn Li vokis, ne nur el la Judoj sed ankaŭ el la gojoj. 25 Kiel Li diras ĉe Hosea:

Kio nomiĝis 'ne Mia popolo', tion Mi nomos 'Mia popolo',
kaj kiu estis ne amata, ŝin <Mi nomos> 'Mia plej amata'.

26 Kaj je la sama loko, kie estis dirite al ili:

Vi ne estas Mia popolo,
tie ili nomiĝos infanoj de l' vivanta Dio.

27 Kaj koncerne Izraelon Jesaja ekkrias:

Se eĉ la Izraelidoj estus multnombraj kiel la mara sablo,
tamen saviĝos <nur> la restaĵo.

28 Ĉar la Sinjoro konfirmos Sian parolon surtere,
komplete kaj rapide.

29 Jesaja jam estis dirinta:

Se la Sinjoro de l' armeoj ne postlasus al ni iom da semo,²³
ni estus similiĝintaj je Sodom kaj Gomora.

Izrael kaj la celo de la Torao

30 Kion el tio ni konkludu? Ke la gojoj kiuj ne strebadis al justeco, tamen akiris ĝin, nome la justecon pere de l' fido. 31 Sed Izrael, kun tuta sia fervoro por la Torao de justeco, ne atingis la celon de la Torao. 32 Kaj kial ne? Ĉar ili opiniis ke ili povos apogiĝi sur siaj faroj, ne sur la fido. Ili kontuziĝis kontraŭ la ŝtono de l' kontuziĝo, 33 kiel estas skribite:

Jen, en Cion Mi metas ŝtonon de kontuziĝo, stumbligilon.
Kiu fidas je ĝi ne seniluziĝos.

10: 1 Gefratoj, estas mia arda deziro, kaj mi preĝas Dion, ke ili saviĝos. 2 Mi atestas ke ili fervoras por Dio, sed estas fervoro sen kompreno. 3 Per sia nescio pri la justeco de Dio kaj per sia klopodado starigi propran justecon, ili ne submetis sin al la Dia justeco. 4 Ĉar Mesio estas la celo de l' Torao, por justeco por ĉiu kiu fidas.

justeco el la fido

5 Pri la justeco el la Torao Moseo skribas: *La homo kiu ĝin plenumas, per ĝi trovas la vivon.* 6 Sed la justeco el la fido jene parolas: *Ne diru al vi mem: Kiu leviĝos ĉielen? Tio estas: por igi Mesion malleviĝi.* 7 Aŭ: *Kiu malleviĝos en la subteron? Tio estas: igi Mesion releviĝi el la mortintoj.* 8 Sed kion diras la Skribo? *La vorto estas apude al vi, en via buŝo, en via koro,* la vorto de la fido, kiun ni heroldas. 9 Ĉar se per la buŝo vi konfesas ke Jesuo estas la Sinjoro, kaj se en via koro vi kredas ke Dio relevis lin el la mortintoj, vi saviĝos. 10 La kredo de via koro havigas la justecon, kaj la konfeso de via buŝo la saviĝon. 11 Jen tiel ĝin diras la Skribo: *Neniu fidanta je li seniluziĝos.* 12 Ja ne estas diferenco inter Judoj kaj Grekoj. Ili ĉiuj havas la saman Sinjoron, riĉan je donacoj por kiuj alvokas lin. 13 Ĉiu alvokanta la nomon de l' Sinjoro, saviĝos.

la malobeo de Izrael

14 Sed kiel oni alvoku iun, je Kiu oni ne fidas? Kiel oni kredu je iu, se oni ne aŭdis pri Li? Kiel oni aŭdos, se neniu heroldas Lin? 15 Kaj kiel oni heroldu, se oni ne estas sendita?

Kiel diras la Skribo: Kiel plaĉaj estas la piedoj de tiuj kiuj heroldas la bonan novaĵon! 16 Sed ne ĉiuj aŭskultis la bonan novaĵon. Jesaja ja diras: Sinjoro, ho kiu kredis je niaj paroloj? 17 La fido do devenas el la mesaĝo, kaj la mesaĝo el ordono de Mesio.

18 Sed, mi demandas: ĉu eble ili ĝin ne aŭdis? Tamen jes:

Ilia sonoro disvastiĝis tra la tuta mondo,
iliaj paroloj resonis ĝis la ekstremaĵoj de la loĝata tero.

19 Sed, mi ree demandas: ĉu eble Izrael ne komprenis ĝin? Unuavice jen diras Moseo:

Mi ĵaluzigos vin pri popolo kiu ne estas popolo,
kaj enviigos vin pri popolo sen kompreno.

20 Kaj Jesaja jen kuraĝas esprimiĝi:

Mi lasis Min trovi de kiuj ne serĉis Min,
Mi Min montris al kiuj ne demandadis pri Mi.

21 Sed koncerne Izraelon li diras: *La tutan tagon Mi streĉis Miajn manojn al popolo malobea kaj ribelema.*

restaĵo elektita

11: 1 Jen do mi demandas: Ĉu Dio repudiis Sian popolon? Nepre ne. Ja ankaŭ mi mem estas Izraelido, ido de Abraham, el la tribo Benjamin. 2 Ne, Dio ne repudiis Sian popolon, kiun Li antaŭe ekkonis. Ĉu vi ne scias, kion diras la Skribo en <la historio pri> Elija, kiel li kulpigas Izraelon antaŭ Dio? 3 Sinjoro, viajn profetojn ili mortigis kaj Viajn altarojn ili renversis. Mi sola postrestas, kaj ili minacas mian vivon. 4 Sed kion respondas al li la Dia orakolo? Sep mil virojn Mi ankoraŭ havas,

²² Ĉu frazo nekompleta?

²³ Ĉu sem-greno, ĉu: posteularo?

kiuj ne genuiĝis antaŭ Baal. 5 Tiel estas ankaŭ en la nuno. Restaĵo postrestas, dank'al la gracoplena elekto. 6 Sed se estas el graco, do ne estas pro meritaj agoj, ĉar alie la graco ne plu estus graco.

7 Kio do? Izrael ne atingis kion ĝi alstrebis. Nur la elektita parto atingis la celon; la ceteraj ŝtoniĝis, 8 kiel estas skribite:

*Dio sensentigis ilian spiriton.
Okulojn Li donis al ili, kiuj ne vidas;
orelojn kiuj ne aŭdas,
ĝis la hodiaŭa tago.*

9 Kaj David diras:

*Ilia tablo fariĝu por ili ŝnuro, kaptilo,
stumbligilo, kaj puno.*

10 Iliaj okuloj obskuriĝu, ke ili ne vidu.

Kurbigu ilian dorson senĉese.

Izrael kaj la saviĝo de la gojoj

11 Mi do demandas: Ĉu ili tiom stumblis, ke ili falis? Nepre ne, sed sekve de ilia mispaŝo saviĝis la gojoj, por enviigi ilin. 12 Se ilia mispaŝo riĉigis la mondon kaj ilia malsukceso riĉigis la gojojn, kion <ni do atendu> el ilia pleno!

13 Nun mi parolas al vi, kiuj venis el la gojoj. Ĝuste kiel apostolo por la gojoj, tiun ĉi diakonecon tial mi taksas tiel alte, 14 ĉar mi esperas enviigi mian propran popolon kaj savi almenaŭ kelkajn el ili. 15 Ĉar se ilia malakcepto donis repaciĝon al la mondo, kion alian do <povos signifi> ilia akceptado se ne vivon el la mortintoj?

16 Se sanktas la unuaĵoj de l' faruno, do ankaŭ la pasto. Se sanktas la radiko, do ankaŭ la branĉoj. 17 Se do forŝiriĝis kelkaj branĉoj, kaj vi — sovaĝa olivarbo — engreftiĝis tie kaj ekĝuis je la suko de la olivarbo, 18 do ne altigu vin super la branĉoj! Se vi volas altigi vin, vi memoru ke vin portas la radiko, kaj ne vi la radikon. 19 Vi diros eble: Sed ja forŝiriĝis branĉoj, por ke mi engreftiĝu. 20 Tute prave, ili estis forŝiritaj pro sia nefido, kaj vian lokon vi <ŝuldas> al via fido. Sed bone atentu, ne estu tro fieraj. 21 Se la branĉojn kiuj nature apartenis al la arbo, Dio ne indulgis, ankaŭ vin Li ne indulgos. 22 Tial la Dian bonecon atentu, sed same Lian severon: la severon por la <branĉoj> kiuj defalis kaj la bonecon por vi, se vi almenaŭ restos en Lia boneco. Alie ankaŭ vi deŝiriĝos. 23 Kaj kiom koncernas ilin: se ili ne obstinos je sia nefido, ankaŭ ili reengreftiĝos. Ĉar Dio kapablas reengrefti ilin. 24 De la sovaĝa olivarbo vi deŝiriĝis, al kiu laŭnature vi apartenas, kaj kontraŭ via naturo vi engreftiĝis sur la noblan olivarbon. Kiom pli facile do tiuj, kiuj laŭnature apartenas al ĝi, reengreftiĝos sur sian propran olivarbon!

la saviĝo de Izrael

25 Mi, gefratoj, ne volas lasi vin sensciaj pri ĉi mistero: ne trotaksu en ĉi tio vin mem: la ŝtoniĝo kiu venis super parton de Izrael, nur daŭros ĝis la plimulto de l' gojoj estos enirintaj. 26 Kaj tiel saviĝos finfine tuta Izrael, kiel estas skribite:

El Cion eliros la savanto

kaj li forigos la sendiecon el Jakob.

27 Tio ĉi estas la interligo, kiun Mi faros kun ili,

kiam iliajn pekojn Mi forigis.

28 Se — por via profito — ili eĉ estos malamikaj el la bona novaĵo, tamen ili restos la amatoj <de Dio> pro elektiĝo, pro la patriarkoj²⁴.

29 Ĉar Dio ne pentas pri Siaj graco-donoj aŭ pri Sia vokanteco.

30 Kiel siatempe vi estis malobeaj al Dio, sed nun, dank' al ilia malobeo, trovis kompaton, 31 tiel, pro la kompatato montrita al vi, ankaŭ ili nun malobeas, por ke ankaŭ ili nun trovu kompaton. 32 Tiel ĉiujn Dio enfermis en malobeo, por kompati pri ĉiuj.

laŭdo al Dio

33 Ho nesondebla riĉo de Dia saĝo kaj scio! kiel nespureblaj estas Liaj decidoj, kiel nespureblaj Liaj vojoj!

34 Ĉar kiu konas la pensojn de l' Sinjoro? Kiu estis Lia konsilisto?

35 Kiu kiel unua ion donis al Li, kaj povas postuli rekompencan?

36 Ĉar el Li, kaj per Li, kaj al Li estas ĉio. Al Li estu la gloro poreterne! Amen.

dediĉi sin al Dio

12: 1 Nun, gefratoj, mi admonas vin je l' Dia kompatemo: Prezentu vin al Dio kiel vivantan, sanktan oferon, plaĉan al Li. <Tio estas> via spirita diservo. 2 Ne sekvu la skemojn de ĉi mondo. Sed metamorfoziĝu, en novan vidmanieron. Tiam vi kapablos prijuĝi, kion Dio deziras <de vi>, kaj kio estas bona, plaĉa kaj perfekta.

unu korpo — multaj membroj

3 Je la graco kiun Dio donis al mi, mi do diras al ĉiu el vi: Ne konsideru vin mem pli grava ol indas, sed pensu pri vi mem singardeme, ĉiu laŭ tio, kiom da fido Dio donis al li. 4 Ĉar same kiel ni en nia korpo havas multajn membrojn kaj ne ĉiuj membroj havas la saman funkcion, 5 tiel ankaŭ ni en Mesio formas unu korpon, kaj ĉiuj unuope ni estas membroj unuj de l' aliaj.

6 La spiritaj donoj²⁵ kiujn ni havas, diferencas laŭ la <specifa> graco kiun ricevis ĉiu el ni: se <tio estas> la dono profeti, <uzu ĝin> konforme al la fido. 7 Se <estas> la dono de diakoneco aŭ instruado, do <dediĉu vin> al diakoneco aŭ instruado. 8 Kiu povas kuraĝigi aliajn, faru do tion. Kiu havas ion por disdoni,

²⁴ Tio estas Abraham, Izaak, Jakob, Jozef.

²⁵ Laŭlitere: la ĥaris-moj.

disdonu sen krompensoj. Se vi estras, faru ĝin diligente; se vi estas kompata, do faru tion ĝojplene.

amo al ĉiuj

9 Vi amu sen ŝajnigo. Malamu la malbonon, persistu pri la bono. 10 Amu vin reciproke per amo gefrata. Klopodu por superi unu la alian en ĝentileco. 11 Via diligento ne obtuziĝu, spirite vi estu viglaj, servu la Sinjoron. 12 La espero ĝojigu vin, tenu vin firme en premateco, obstinu pri la preĝado. 13 Kontribuu por la bezonoj de la sanktuloj, flegu la gastemon. 14 Benu tiujn, kiuj persekutas vin; benu anstataŭ malbenu. 15 Ĝoju kun la ĝojantoj, ploru kun la plorantoj. 16 Vivu harmonie unu kun la alia. Ne estu arogantaj, sed dediĉu vin al simplaj taskoj. *Ne opiniu vin mem saĝaj.* 17 Al neniuj vi repagu malbonon pro malbono. *Intencu bonon al ĉiuj homoj.* 18 Vivu, kiom dependas de vi, en paco kun ĉiuj homoj. 19 Ne venĝu vin, amataj, sed lasu tion al la Dia kolero; estas ja skribite: *Al Mi apartenas ĉiu venĝo, Mi rekompencos*, diras la Sinjoro. 20 Sed *se malsatas via malamiko, donu al li manĝi. Se li soifas, do donu al li trinki. Tiel vi amasigos brulajn karbojn sur lia kapo.* 21 Ne lasu vin venkiĝi de la malbono, sed venku la malbonon per la bono.

sinteno antaŭ la aŭtoritatuloj

13: 1 Ĉiu homo submetiĝu al la aŭtoritatuloj kiuj estas super li. Ĉar ĉiu aŭtoritato devenas de Dio. Ankaŭ la ekzistantan aŭtoritaton Dio estigis. 2 Do, kiu rezistas la aŭtoritaton, rezistas al la Diaj ordonoj, kaj kiuj faras tion, tiuj alvokas kondamnon super si. 3 La regantojn vi ne bezonas timi ĉe bona faro, sed ja ĉe malbona. Se vi deziras vivi sen timo pri la magistrato, do vi agu bone, kaj la magistrato vin laŭdos. 4 Ĉar <la magistrato> estas diakono de Dio, por via bonfarto. Sed se malbone vi agas, tiam vi timu; ĝi ja ne senkiale portas la glavon. Ĝi estas diakono de Dio por doni la merititan punon al la malbonulo. 5 Tial necesas, ke vi submetiĝu al ĝi, ne nur pro timo je puno, sed ankaŭ por bona konscienco. 6 Samkiale vi ankaŭ pagas la impostojn. La oficistoj servas al Dio, kaj al tio ili donas sian atenton. 7 Al ĉiuj do donu, kion ili rajtas ricevi: impostojn kaj vojdepagojn al tiuj, al kiuj impostojn kaj vojdepagojn <vi ŝuldas>, respekton kaj honoron al tiuj, al kiuj respekton kaj honoron <vi ŝuldas>.

la amo plenumas la Toraon

8 Atentu ke al neniuj ion vi ŝuldu. <Via sola ŝuldo estu> la reciproka amo. Kiu amas la alian, tiu plenumis la Toraon. 9 Ĉar la diroj: *Vi ne adultos, vi ne mortigos, vi ne ŝtelos, vi ne deziras*, kaj ĉiuj ceteraj ordonoj resumeblas en tiu ĉi sola diro: *Vi amos vian proksimumon kiel vin mem.* 10 La amo kaŭzas neniun malbonon al la proksimumo. La amo ja plenumas la tutan Toraon.

vigiladi

11 Vi ja scias la horon. Vi scias ke alvenis la horo por vekigi el la dormo. Nia saviĝo nun estas jam pli proksima ol kiam ni venis al la fido. 12 La nokto ekfinaĝas, tagiĝas jam. Ni do seniĝu de la agoj de l' obskuro kaj ni ekipu nin per la armiloj de la lumo. 13 Dece ni kondutu, kiel en plena taglumo, kaj ni detenu nin de drinkfestenoj kaj diboĉado, de malĉasto kaj senbrido, de kverlemo kaj envio. 14 Vestu vin per la Sinjoro Jesuo Mesio, kaj ne dorlotu vian korpon; ne veku ties dezirojn.

esti toleremaj

14: 1 Akceptu ĉiun kiu malfortas en la fido, ne diskutante ties opiniojn. 2 Unu estas konvinkita ke ĉion li rajtas manĝi, dum alia – malforta – manĝas nur vegetare.²⁶ 3 Kiu manĝas viandon, ne malŝatu la alian kiu tion ne faras; kaj kiu ne manĝas viandon, ne kondamnu tiun, kiu ja faras tion. Ĉar Dio ja akceptis tiun alian kiel la Sian. 4 Kiu estas vi, ke vi arogu al vi juĝi pri Alies sklavo? Ĉu li staras aŭ falas, nur koncernas lian Sinjoron. Sed li ja restos staranta, ĉar lia Sinjoro kapablas starigi lin.

5 Unu distingas inter la tagoj, por iu alia ili ĉiuj egalas. Lasu al ĉiuj iliajn konvinkiĝojn. 6 Kiu atribuas valoron al certa tago, faras tion pro la Sinjoro, kaj kiu manĝas, manĝas je la honoro de l' Sinjoro, ĉar Dion li dankas.²⁷ Kiu ion ne manĝas, delasas de ĝi je la honoro de l' Sinjoro, ĉar ankaŭ li dankas Dion. 7 Neniu el ni ja vivas por si sola, kaj neniuj mortas por si sola. 8 Dum ni vivas, ni vivas por la Sinjoro, kaj se ni mortas, ni mortas por la Sinjoro; ĉu vivante ĉu mortante, al la Sinjoro ni apartenas. 9 Por tio ja mortis Mesio kaj reviviĝis: por esti Sinjoro super mortintoj kaj vivantoj. 10 Kun kia rajto vi kondamnas vian fraton? Kaj vi, kial vian fraton vi humiligas? Ni ĉiuj aperos antaŭ la juĝeja seĝo de Dio. 11 Ĉar estas skribite:

Je Mia vivo, diras la Sinjoro: por Mi kurbiĝos ĉiu genuo
kaj ĉies lango jubilos pri Dio.

12 Tiel do pri si mem ĉiu el ni respondecos [antaŭ Dio].

ne kaŭzi skandalon

13 Ni do ne plu kondamnu unu la alian. Prefere vi decidiĝu, ne plu kaŭzi skandalon aŭ indignon al via frato. 14 Mi scias, mi estas konvinkita en nia Sinjoro Jesuo, ke el si mem nenio estas malpura. Io nur malpuras por kiu konsideras ĝin malpura. 15 Sed se vi ĉagrenas vian fraton pro certa manĝaĵo, vi ne plu agas laŭ la

²⁶ Vidu en 1 Kor 8.

²⁷ Per anticipa dankopreĝo.

amo. Ne pelu en pereon per via manĝado iun homon, por kiu mortis Mesio. 16 Ne havigu malbonan nomon al via afero. 17 La regno de Dio ne konsistas el manĝo aŭ trinko, sed el justeco, paco kaj ĝojo en sankta Spirito. 18 Kiu tiumaniere servas al Mesio, tiu estas plaĉa al Dio kaj honorata de la homoj. 19 Ni do strebu al kio kontribuas al la paco kaj la reciproka edifo. 20 Ne malkonstruu la Dian laboron pro manĝaĵo. Certe, ĉio estas pura, sed ĝi fariĝas malbona, se per sia manĝado oni kaŭzas skandalon. 21 Estas bone ne manĝi viandon, nek trinki vinon aŭ kion ajn, pro kio indigniĝas via frato. 22 Tamen, retenu vian konvinkigon antaŭ Dio. Feliĉa, kiu en siaj decidoj ne riproĉindas. 23 Sed kiu hezitas kaj tamen manĝas, jam estas kondamnita, ĉar li ne <agas> laŭ sia fido. Ĉar kio ne apogiĝas je la fido, estas peko.

15: 1 Ni, kiuj apartenas al la fortuloj, ni havas la devon toleri la tikligemon de la malfortuloj, ne serĉante nin mem. 2 Ĉiu el ni atentu pri la bonfarto kaj la edifo de la proksimulo. 3 Ankaŭ Mesio ja ne serĉis sin mem. Estas ja skribite: La malhonoro de viaj insultantoj trafis Min. 4 Ĉar ĉio siatempe skribita ja estis skribita por nia instruo, por ke ni vivu en espero, dank' al la persistemo kaj la konsolo kiujn ni trovis en la Skriboj. 5 Dio, kiu donas la persistemon kaj la konsolon, atribuu al vi ankaŭ la unuanimecon, kiu decas al vi en Mesio, 6 por ke unukore kaj unube vi gloru la Dion kaj Patron de nia Sinjoro Jesuo Mesio.

7 Akceptu do vin reciproke, kiel ankaŭ Mesio akceptis vin, je la gloro de Dio. 8 Mi celas tion: pro la Dia fidelo Jesuo diakonis al la cirkumciditoj, por certigi la promesojn al la patriarkoj; 9 sed la gojoj gloru Dion pro Lia kompatemo, kiel estas skribite:

*Tial mi laŭdos Vin inter la gojoj
kaj Vian nomon mi himnos per psalmoj.*

10 Kaj aliloke legiĝas:

Ĝoju vi gojoj, kune kun Lia popolo.

11 Kaj ankaŭ:

*Laŭdu la Sinjoron, ĉiuj vi, gojoj;
Lin himnu ĉiuj popoloj.*

12 Kaj Jesaja diras:

*Aperos la radiko de Jiŝaj,
kiu leviĝos por regi la gojojn.
Je li esperos la gojaj popoloj.*

13 La Dio, kiu estas nia espero, plenigu vin per ĉia ĝojo kaj paco en la fido, tiel ke vi superfluu je espero, dank' al la forto de la sankta Spirito.

la laboro de Paŭlo kiel apostolo

14 Gefratoj, mi estas klare konvinkita, ke vi mem bone kapablas konsili unu la alian, ĉar vi plenas je bonaj intencoj kaj riĉas je kompreno. 15 Tamen kelkloke mi skribis al vi kun certa senĝeno, por memori ion-tion al vi, per la <forto de la> graco kiun Dio donis al mi. 16 Li destinis min por la servado de Mesio Jesuo inter la gojoj, por servi la bonan mesaĝon de Dio, por prezenti al Li la gojojn kiel bonvenan

donajon, sanktigitan de l' sankta Spirito.

17 Pri tio en Mesio Jesuo mi povas fieri antaŭ Dio. 18 Ĉar mi ne kuraĝos paroli pri io alia ol kion efektivigis Mesio pere de mi por konvertiĝo de la gojoj, en diroj kaj agoj, 19 en imponaj mirakloj, per la forto de l' Spirito. De Jerusalemo kaj ĉirkaŭaĵo ĝis Ilirio mi tiel sukcesis heroldi la bonan mesaĝon de Mesio. 20 Sed por mi estis afero de honoro, ne heroldi la bonan mesaĝon, kie la nomo Mesio jam estis menciata, por ke mi ne konstruu super fundamento kiun metis aliaj. 21 Estas ja skribite:

*Vidos ĝin tiuj, al kiuj ne estis mesaĝite pri Li;
kiuj ne aŭdis pri Li, tiuj ekkomprenos.*

vojaĝoplanoj

22 Tio min ade malhelpas por veni al vi. 23 Sed nun ĉi-regione mi ne plu havas laborteron kaj jam jarojn mi arde esperas viziti vin, 24 irante al Hispanio. Mi ja esperas survoje vidi vin kaj esti ekipita de vi por mia vojaĝo tien, post kiam certan tempon vian gastamon mi estos ĝuinta. 25 Nun mi estas ekironta al Jerusalemo por subteni la sanktulojn. 26 Ĉar Macedonio kaj Aŭajo decidis okazigi monkollektadon por la malriĉuloj inter la Jerusalemaj sanktuloj. 27 Bela decido, sed tiuj ja estas iliaj ŝuldantoj: ĉar la gojoj ekpartoprenis en iliaj spiritaj donoj, siaflanke tiuj estas devigitaj materie subteni ilin. 28 Post kiam ĉi taskon mi estos plenuminta kaj kiam mi transdonis al ili ĉi rezulton, tra vian urbon mi vojaĝos al Hispanio. 29 Mi certas, ke kiam vin mi vizitos, mi venos kun la plena beno de Mesio.

30 Sed mi alvokas vin, [gefratoj,] je la nomo de nia Sinjoro Jesuo Mesio kaj je la amo de l' Spirito: Subtenu min en la batalo; preĝu por mi al Dio, 31 ke la ne-fidulojn en Judajo mi eskapu, kaj ke mia help-agado²⁸ por Jerusalemo estu bonvena ĉe la tieaj sanktuloj. 32 Tiam, se Dio volas, plenĝoje mi venos al vi kaj viameze mi ekripozos. 33 La Dio de la paco <estu> kun vi ĉiuj! Amen.

salutoj

16: 1 Mi rekomendas al vi nian fratinnon Feba, diakonon²⁹ de l'

²⁸ Laŭlitero: mia diakoneco.

²⁹ Tiuj ĉi salutoj, ĉe atenta legado, liveras kelkajn ankaŭ sociologie interesajn detalojn pri la frua kristana movado: ŝajne ne estis diskriminacie rilate sekso por la diversaj ekleziaj 'oficoj': Feba estas diakono, same kiel Timoteo en 1 Tes 3:2 kaj Tihiko en Ef 6:21 kaj en Kol 4:7. 'Diakono' ne jam estis la eklezia funkcio kiun el plipostaj epokoj ni konas, des malpli la 'diakonino' de l' protestanta tradicio... Konstatindas krome, ke Paŭlo, menciante la supozeble geedzan paron Priska kaj Akvilo (Prisca & Aquila), ankaŭ konatajn al ni el pluraj apokrifaj tekstoj, komencas per la ina partnero; tio implicas, certe laŭ la tiamaj esprimkutimoj, ke ŝi estis la pli grava el ambaŭ; oni ja absolute ne jam konis nian „virinon unue...". Probable malĝustas la foje farata sugesto, ke Priska kunlaboris ĉe la predikado, ĉar kiel virino ŝi povis esti akceptita en inajn rondojn, kie ŝia edzo ne tiel facile povus eklabori. Aŭ, se tiu supozo jes havas ian faktan bazon, tiam minimume ŝi ne nur predikis al virinoj: vidu en Agoj 18:24-26, kie la geedza paro ambaŭ klarigas kristanismon al Apolos. Iom pli poste, en Rom 16: 7, apud certa (s-ro) Androniko, ankaŭ (s-inon) Junian ni renkontas en la 'ofico' de apostolo. Pluraj nacilingvaj tradukoj, probable sub influo de la tradiciaj — bedaŭrinde plurfoje negativaj — sintenoj pri la virino en la eklezio, ŝanĝis ŝian — tipe inan — nomon en viro-nomon.

komunumo³⁰ en Kenĥreo³¹. 2 Bonvenigu ŝin en la Sinjoro kiel decas sanktulojn, kaj helpu ŝin en ĉio, en kio vian helpon ŝi bezonas. Ĉar mem ŝi estis por multaj, ankaŭ por mi, patrono. 3 Brakumu Priskan kaj Akvilon, miajn kunlaborantojn en Mesio Jesuo, 4 kiuj riskis por mi sian vivon; ne nur mi ŝuldas dankon al ili, sed ankaŭ

ĉiuj komunumoj de gojoj; 5 <salutu> ankaŭ la komunumon ĉe ili hejme. Brakumu mian amatan Epeneton, la unuaulon de Azio por Mesio. 6 Brakumu Marian, kiu tiom klopodis por vi. 7 Brakumu Andronikon kaj Junian, miajn samgentanojn kaj kunkaptitojn, estimatajn inter la apostoloj, kiuj jam pli frue ol mi estis en Mesio. 8 Brakumu Ampliaton, mian amatan <amikon> en la Sinjoro. 9 Brakumu Urbanon, nian kunlaboranton en Mesio, kaj mian amatan Staĥison. 10 Brakumu Apeleson, tiun veran mesieculon. Brakumu tiujn kiuj <apartenas al la domo> de Aristobulo. 11 Brakumu mian samgentanon Herodiono. Brakumu la sekvantojn de la Sinjoro kiuj <apartenas al la domo> de Narciso. 12 Brakumu Trifenan kaj Trifozan, kiuj klopodas en la servo de l' Sinjoro. Brakumu mian amatan Persidan, kiu multe klopodis por la Sinjoro. 13 Brakumu Rufon, la elektiton de l' Sinjoro, kaj ties patrinon, kiu <fariĝis> ankaŭ mia <patrino>. 14 Brakumu Asinkriton, Flegonon, Hermeson, Patrobason, Hermason kaj la gefratojn ĉe ili. 15 Brakumu Filologon kaj Julian, Nereon kaj ties fratinojn, kaj Olimpiadan, kaj ĉiujn sanktulojn ĉe ili. 16 Brakumu vin reciproke per sankta kiso. Vin brakumas ĉiuj komunumoj de Mesio.

17 Gefratoj, mi admonas vin, ke tiujn vi atentu, kiuj kaŭzas ĉiaspecajn kverelojn kaj skandalojn, kontraŭe al la instruo kiun vi ricevis. Evitu ilin. 18 Tiaj homoj ja ne servas al nia Sinjoro Mesio, sed al la propra ventro, kaj per siaj piaj kaj belsonaj diroj ili erarigas la naivajn homojn.

19 Via obeemo al la bona mesaĝo ĉie diskoniĝis; pri vi mi do ĝojas. Kaj tiaj volonte mi vidas vin: plene instruitaj pri la bono kaj ne impreseblaj por la malbono. 20 Tiam la Dio de la paco baldaŭ neniigos la Satanon sub viaj piedoj.

La graco de nia Sinjoro Jesuo <estu> kun vi.

21 Brakumas vin mia kunlaboranto Timoteo kaj miaj samgentanoj Lukio, Jasono kaj Sosipatro. 22 Brakumas vin ankaŭ en la Sinjoro mi, Tercio, kiu skribis ĉi leteron. 23 Brakumas vin Gajo, la gastiganto de mi kaj de la tuta komunumo. Brakumas vin Erasto, la prizorganto de la urbaj financoj, kaj nia frato Kvarto.

laŭdo al Dio

25 Al Li kiu havas la povon fortigi vin – laŭ la bona mesaĝo de Jesuo Mesio kiun mi heroldas, kaj laŭ la malkaŝiĝo de l' sekreto, kiu dum jarcentoj restis sigelita 26 sed kiu nun diskoniĝis, surbaze de profetaj skriboj pro ordono de l' eterna Dio, por ke ekobeu al la fido ĉiuj gojaj popoloj – 27 al Li, la sola ĉiosaĝa Dio, estu la regado, per Jesuo Mesio en eternon. Amen.

³⁰ Laŭlitere ĉi tie kaj plurfoje poste: la eklezio.

³¹ Konata havenurbo de Korinto.

ĈU SPIRITLEGAĴEMULOJ AŬ BAGATELIGĈASEMULOJ?

Antaŭ la nova traduko „AL LA ROMANOJ” de G. BERVELING.

Kun *Dia Regno* enmane (N-ro 3/2001) kaj subokule la unua ĉapitro de AL LA ROMANOJ ĵus esperantigita, de G. BERVELING, el la antikva biblia helena, vere viglas la vespero dediĉita al la kulturo; se plie oni kapablas tiun tradukaĵon kompari kun aliaj tiutekstaj, eĉ alilingvaj, oni povas gliti sur ekzegezoz tra skolaj interpretoj, kaj finiĝi por bedaŭri esti apenaŭ lertita en tro malmultaj el la multegaj sciobranĉoj nepraj por tradukanto de bibliaj tekstoj: antikvaj lingvoj, modernaj lingvistiko-facetoj, historio kaj historiografio, psikologio ktp. Kiel, alimaniere, aŭdaci esprimi eĉ nurajn konsentojn? Kaj, tamen, por ne resti en la kaĝo de silentaj komplezoj, kiel forfuĝi el la tento diri opiniojn? Tiuj ĉi nun estas ĉiuj gratulantaj, dezirantaj pligratuli kiam oni povos legi la tradukaĵon de la tuta letero al la Roma-



Armando ZECCHIN fotita en Zagreb de P.C.

noj, kun ĝia interpreto: interpreto ĉar traduko estas ankaŭ reinterpreto ĉar certe la tradukinto celas ne nur plibonigi la lingvon; kaj, tial, des pli da gra-

tuloj ju pli oni komprenas ke, tiuspecaj intreprenoj nemalofte engaĝas plurajn diversfakajn kunlaborantojn.

Tiu de ĉi vespero, estas nur ekjuĝo, neniel pri stilaj kaj sciencaj teknikaĵoj plenumitaj, nur tiu fontanta el kutimiĝo je bibliaj legaĵoj kaj komparo inter bibliaj libroj. Kaj do jen nun nia, kvankam unuavida, juĝo: la traduka stilo igas pli klara ol aliaj stiloj la Paŭlan penson. Kiel sciante, foje la pensoj de Paŭlo surmetiĝas kiel marondoj ekscitantaj kapdoloron al la leganto: ĉi tie la sinsekvoj de pensoj estas malsumetigitaj per aldona interpunkcio faciliganta la komprenon. Eble kelkaj kuntirus la nazon; sed la nova traduko, laŭ ni, havas certe ankaŭ disvastigan celon, tial konvenas kvietigi la furion de Paŭlo por pli bona komprenigo.

Ni konsentas kun ĉio, rezervante tamen pli maturajn juĝojn por la fino de la legindaĵoj. Nur iomene patrolas ĉirkaŭ ni tiu „Kristo” farita „Mesio” ĉar al ni ŝajnas malriĉigon de la Paŭla penso. Kristo por Paŭlo estas io malsama kaj plia ol Mesio de la tiama palestina mesianismo: tiu ĉi precipe antaŭmontris Mesion potencan, solvantan pri politikaj kaj sociaj suferoj, kaj kiam lin oni bildigis kiel valoriganton de humiluloj, ĝuste al tio li estis celigita. Ĉiukaze la Kristo de Paŭlo purigas kaj kribras inter la tuta konceptaro pri Mesio. Krome, la Kristo de Paŭlo havas eksplicitajn diajn antaŭaĵojn: tial la greka termino Kristo entenas multe pli ol la simpla vorto Mesio, el kio certe ĝi unuasemantike devenas. Ĉu eblas imagi ke, diktante tiun

ĉi leteron, Paŭlo strebis senvesti sian Mesion el la karakterizoj kiuj al li estas atribuataj en aliaj samaludaj letereroj? Evidente la tradukinto apogiĝas sur aliaj kriterioj ne tute malaprobindaj.

Iom min ĝenas ankaŭ, sed tion ne rilatas rekte al la traduko, „saĝuloj kaj neinstruitoj” de la versiklo 1:14 al kiuj Paŭlo sin deklaras ŝuldanto: la terminoj ne ŝajnas tro kontraŭaj ĉar eĉ neinstruitoj povas ĝui kaj estiĝi saĝuloj. Ĉu Paŭlo simple celas deklari ke li ŝuldas al doktoj kaj nedoktoj aŭ saĝuloj kaj „senprudentuloj” (kiel en la Londona traduko)? Tiel inter ni estis interpretita la frazo; nun ĝi al ni aperas sub nova lumo. Ĉu eblas ke Paŭlo sin sentas ŝuldanto (ĉu li ricevis ion de ili aŭ ĉu li ŝuldas ion al ili?) al la saĝuloj same kiel al la neinstruitoj, neniel al la instruitoj? Kion vere intencis Paŭlo? aŭ li ne distingis? Ĉu en la greka σοφοὺς καὶ ἀνοήτους estas sufiĉe klaraj? Ĉu ne sendamaĝa dubsenceco naskiĝas el la esperanta vorto kiu en saĝuloj enhavigas ankaŭ instruitojn kaj saĝulojn? Ĉu eblas kompreni la okazan nuancon de Paŭlo? Laŭ ni, Paŭlo klopodas diri ke la savo estas por ĉiuj sen zorgo pri la ekzaktaj vortoj, kiel manifestiĝas el la sekva esprimo kiam estas dirate ke Dio celas savi „unue la hebreojn sed ankaŭ la grekojn”. Ja, kaj kie kaŝiĝis la barbaroj, kiujn li distingis el la grekoj?

Ni daŭrigos legi kaj mediti paŝe-paŝe kun la aperado de aliaj novesperantigitaj „al la Romanaj” ĉapitroj en *Dia Regno*. Kaj kiu scias ĉu oni rajtas esperi ke eĉ tio kontribuu pliiĝi la konsideron, trans la kredago, pri komunaj bibliaj tekstoj kies letera senco fariĝas ĉiam pli malfirma ĉar skuata de lingvosciencoj, de strukturalismoj kaj kontraŭstrukturalismoj kaj nekonsciaj psikologioj ĝis

teologiaj kaŝitaj stereotipoj...

Ni certas ke la tradukinto-interpreto pretas preterlasi eventualajn niajn nurajn miskomprenojn ĉar la valoraj, kiel la nia!!, legadoj ignorigas kelkajn misetojn aperintajn nur pro manko de informo pri la kriterioj sekvitaj de la tardukinto.

Kaj ĉu ni sendos al *Dia Regno* tiun ĉi nian unuan supraĵan vagadon inter la esperantigitaj versikloj de „al la Romanaj”? Jes, ni provos!... Ankaŭ por ke oni vidu ke ni sekvas la feliĉan sugeston de fama artikolisto kiu diris: bona artikolo brile absorbas komence kaj brile galopas finen forpontante la mezon!

Armando ZECCHIN



AMO

Am' bonvenigis; la anim' retiris,
Polva, pek-makulata.
Vidantemin, post kiam mi eniris,
Heziti, Amo gvata
Pliproksimiĝis, dolĉe demandanta
Ĉu io estas mankanta.

Respondis mi, «Gast', digna ĉeestulo».
Am': «Mi gastigos vin».
«Mi, kruda kaj sendanka? Mi, karulo,
Ne povas rigardi cin».
Manpremis Am', kaj faris dolĉan
ridon: «Ĉu vi donis la vidon?»

«Prave; sed mi difektis; honto mia
Foriru kiel kulpanto».
Am' diras, «Kiun ŝargis kulpo via?»
«Mi estu la servanto».
«Sidiĝu, ĉar la manĝon mi aranĝis».
Do sidis mi kaj manĝis.

George HERBERT (1593-1633)
(Esperantigis Michael CAYLEY)

Ekumenismo

El Zagreba Ekumena Kongreso ekumenismo interkupea.

EKUMENISMO ĈU NUR OKAZO DE AGORDIĜA UNUIĜO AŬ ANKAŬ APARTIĜO DE KRISTANOJ?

Ni estis kvin sur tiu trajno de Zagrebbo al Italio kaj Francio tra Kroatio kaj Slovenio post la refreŝiga kaj bananta ekpluvego de la zagreba kongresejo ĝis al la stacidomo, piede subombrele kun valizoj, meznokte gaje portataj pro kontenta konscienco pri la profitdona partopreno en la ekumena kongreso en de la 21-28 de julio 2001. Ni ne sukcesis trovi tuj lokon en la sama kupeo; kiam ni sukcesis rekuniĝi, estis seneksplicite decidite ke por la dormo estas ĉiam la tempo, nun oni povas ekvidi la freŝan vivon jam en retrospektivo kaj komenti kaj konsenti aŭ malkonsenti kaj kritiki aŭ priridi, kun spontane bonvola amuzemo, la diversajn kongresajn protagonistojn. Sed en tiu ĉi paĝo la kompilisto flankelasu tiun amuzemon ĉar ververe nia konversacio fariĝis pli serioza kaj samtempe preskaŭ kaj pasie transakademia.

— Ni kunvokiĝis, iu eklanĉas, por ekumenecaj motivoj sed pri ekumenismo oni parolis neniel. Ni finiĝis por adori libron, la ĵus eldonitan ADORU-n...

— Tamen, oni atentigas, la profundiĝo en ADORU-n trenis ĉiam elementojn de ekumeneco, kiel la himnojn de evangelia kaj katolika deveno aŭ inspiro. Eble vi vagadis laŭbistre dum la prelego de la karmela pastro, kiu parolis pri la vivita en Kroatio ekumenismo, aŭ tiu de G. BERVELING kiu proponis kaj tiusence jam agadas por kunlibrigi, almenaŭ prese, duakanonajn librojn kun la kanonaj

bibliaj libroj.

— Mi, aldonas alia, partoprenis ĉiam, sed fine al mi restis ankoraŭ scivolemo: kio estas ekumenismo?

Ja kio ĝi estas? Kien ĝi celas?

— Krei el multaj unu solan eklezion, estis la unua lanĉo. Sed tio ne eblas ĉar ĝuste en la ekumenismema etoso ĉiu parto ekzaltas siajn doktrinajn kaj praktikan dogmaron. Se tia unuiĝo estas la celo, eble ĝi estas neatingebla.

— Laŭ mi, reeĥas alia, ekumenismo celas krei unuiĝon kiun ajn sendepende de propraj dogmoj. Unuiĝi nur per iuj komunaj tradicioj. Sub tia aspekto, bonŝance okazas ke diversfonte kunvenantaj plurekleziaj anoj engaĝiĝu plielfosoj kaj pliprofundiĝi en siajn originalaĵojn kaj reveki la spiritan kuntekston de sia elstariĝo. Sed ĝuste en tio oni trovas komunajn kredelementojn. Tio min ne agitas.

— Eĉ tia minimumo, laŭ alia kupeano, estas tro, ankoraŭ tro, ĉar la vekigo de la originaj cirkonstancoj malfermas diatribojn aŭ juĝojn rilate vivitajn historiajn okazaĵojn pri kiuj dismontriĝas kontrastaj interpretoj. Eble ekumenismo devas nur celi la reciprokan pacan konatiĝon: reciproke konigi al la aliaj sian propran kredon kaj provi kompreni la rajtojn de aliaj. Ankoraŭ svarmas prijuĝoj kiuj igas malfacilaj eĉ la renkontiĝojn kaj la paroladojn senpasiajn, eĉ en oficialaj amasaj kunsidoj kaj en reciprokaj komentoj.

— Laŭ mi, elĵetas la kvara, ĉe la diversaj eklezioj ekumenismo devas helpi la kreadon de komuna kristana respondo al la postuloj kaj bezonoj de la postmoderna kulturo, laŭ kiu jam la homa racio ne kapablas koni kaj difini moralan naturan leĝon kaj ion scii pri la ekzisto mem de Dio ktp. Iam, en la tempo de la moderneco, al ni oni liveris precizajn certecojn kvankam infektitajn per sciencismo, nun eĉ la „duraj” sciencoj perdas sian definitivitan certecon kaj aparte la historiaj kaj antropologiaj kaj homaj sciencoj. Al la moderna pretendo de tiuj sistemoj kiuj sin kredis ĉesojle de la kompleta senescepta komprenado kaj akirado de respondo sur kaj pri ĉio, nuntempe anstataŭiĝis la dubo pri ĉio, intencita kiel definitiva frukto de multaj modernaj sciencoj. Sur tiaj bazoj ankaŭ la historiaj religioj, ĉesigante la entuziasman senfundamentan modernan ĉiosciemon, flosos en la ŝanceliĝejo. Urĝas komunaj plurekleziaj strategio kaj respondo. Sen tiu kompetenta kaj komuna respondo, kristanismo ne havas ŝancon. Jen la tasko de ekumenismo.

— Laŭ mi, male, enŝtelas la kvina, ne ekskludendas ke iu eklezio timas esti fagocitata de alia. Ne ekskludendas ke iu plikonscius pri febleco de siaj fundamentoj kaj abomenus la dialogon mem.

— Sed se la eklezioj, oni rebatas, interparolas povas okazi ke ili malkovru ke la apartiĝo ne havas tiom da rajtoj por ekzisti.

— Ankaŭ ne ekskludendas ke ekumenismo puŝas barikadi kaj akcenti siajn distingojn distancigante la kredojn kaj favorante al kromaj disdividoj. Kiel ne pensi, kaj eĉ observi, ke malantaŭ ĝentilaĵoj kaŝiĝas kaj kamufliga subti-

laj ruzecoj por absorbi geanojn de aliaj eklezioj?

— Mi tion ne vidas, reagis silentema: eble tiu via vido devenas el la sama timo kiun vi kritikis. Laŭ mi, en ekumenismo ĉiu eklezio rajtas diri kaj pensi kion ĝi volas kaj la aliaj devas nur respekti aŭ, se ne konsentante pri la doktrino, ne sin permesi malkovri subkuŝantajn ruzajn intencojn aŭ atencajn proponojn de ofendemaj ruziloj.

— Tamen, oni energie rebatas, ĝis nun komunaj diversekleziaj analizoj pri gravaj kred-punktoj kiel la „pravigo” kunportis komunajn konkludojn kiel okazis inter Katolikoj kaj Luteranoj.

— Laŭ mi, aldonas voĉo de la ronda kupeo (fakte, dume personoj grupiĝis por aŭskulti kvazaŭ por dementi ke seriozaj temoj disigas el la amaso), kristanoj aŭ kristanismoj, tiom misfarajn plenumis laŭ la historio ke ili devas ekumenece pardonpeti al la homaro. La eklezioj devas produkti komunan dokumenton tiurilate kaj iniciati komunan anoncon pro tio ke kristanismo kaj kristanoj estas multe miskomprenataj, aparte inter la esperantistaro, kvankam ne povas ekzisti tro fiaj kalumnioj kaj akuzoj ne jam lanĉitaj de kristanoj kontraŭ kristanoj. Fine ni devas, aŭskultinte kaj pritraktinte la disvastiĝintajn juĝojn pri ni, kune prepari novan apologetikon.

— Sed eĉ tio malfacilas, asertas kelkiu. Oni sin demandis kien, ekster prelegejo kaj eskter liturgiaĵoj, vagadis ortodoksuloj dum niaj prelegoj kaj komunaj preĝoj? Mi scias el kelkaj el ili ke al ili estis eksplicite malpermesita de iliaj episkopoj eĉ la nura pasiva partopreno en religiaj ceremonioj aŭ en prelegoj tiutemaj. Kaj se flanke de katolikoj validas kaj licas la recepto, neceskaze, de

sakramentoj ĉe ortodoksuloj, por tiuj ĉi estas minacata ekskomuniko se ili la samon farus.

— Eble eminentuloj de tiu lasta eklezio krias kontraŭ katolikoj kaj protestantoj esperante sin defendi de la invado de sektoj, kiuj enŝoviĝas ankaŭ ĉe ni.

— Kial ne konjektigi, pluezkamenas alia, ankaŭ pri la malbonaj riskoj de ekumenismo? Ekumenismo pelas akcepti diversecon, sed diverseco pravigas ankaŭ apartecon kaj povas instigi al fermiĝo kaj al elstarigado de siaj veraj aŭ misaj valoroj, al solidiĝo en propraj monologoj. Estus la kontraŭefiko de bona intenco same kiel okazis plurfoje laŭ la historio. Kial ne alertiĝi pri tio?

Kion pri ekumenismo vi antaŭvidas por la estonteco?

— Mi apinie la aferoj restos kiel nun estas, kun eventuala apenaŭa kreskiĝo de reciprokaj afablaĵoj, antaŭe iom afektaj poste pli spontaneigitaj. Kaj kreskos ankaŭ la kunkomprenado de la diferencaj sintenoj.

— Kaj tio, ankaŭ laŭ mi, estos grandega, eble la maksimuma, paŝo. La unuiĝo en dogmoj estas fantazio.

— Laŭ miaj esperoj, iam naskiĝos la komuna dokumento per kiu eklezioj pardonpetas reciproke, po al ĉiuj, kaj ne pro tio ke ili ŝanĝis la komunan doktrinon aŭ entreprenis diferencon interpretadon pri kristanismo (afero pri kiu oni respondecas nur ĉe sia konscienco), sed pro tio ke ili persekutis kaj kalumniis la aliajn. Kiel evidentigas diversaj ĵusaj studoj, la malamikoj de kristanismo nenion fian povas inventi kontraŭ ĝi kio ne estis jam inventita de kristanoj kontraŭ aliaj kristanoj. Sur tiu vojo jam sin metis la papo. Tio kostos multe da humiliĝoj, aktivaj kaj pasivaj. Estos

trinkaĵo dolĉa-amara, sed pasejo nepra.

— Mi volas aŭguri ke la eklezioj trovos komunan vojon al savo montrindan al la postmodernaj homoj tiom enamiĝintaj je la tera vivo ke iu ajn diversa anonco estas opiniata truda elŝteligo en iliajn lulitajn komfortojn. Ne certas ke la ekumenismemaj eklezioj sukcesos tion fari, sed se tion ili ne faros ili perdos la lastan okazon por resti videblaj inter la kulturoj, alimaniere ili finiĝos kiel la nunaj samarianoj en Palestino: malpli ol la klasikaj du katoj... kun la glora pentateŭko tramane!

— Spuriĝas el pesimismo de ŝercemulo jena denova demando: Ĉu ne antaŭvideblas ke la ekumenaj kontaktoj barikadas la ekleziojn malantaŭ pliaj fermiĝo kaj fermiĝo en siaj kredoj? Tial la rezultoj, pro la heterogeneco de la celoj, atingos la kontraŭon!

— Oh ve, ĉi tie vere dismontriĝas la latentoj de skeptikulo kiu kredas dormanta la sanktan Spiriton.

— Bonŝance, iu konkludas, multaj eminentuloj de diversaj eklezioj deklaris ke ekumenismo estas tute koneksa al la kristana kredo mem.

Kion vi faros?

— Mi daŭrigos aŭskulti pritraktojn en kongresoj de ekumenismemuloj esperantistaj!

— Mi... mi preĝos.

— Mi ege timas ke ĉio restos en la nuna startpunkto, kvankam mi scias ke la Sinjoro Jesuo agadas inter ni kaj en ni, kaj konas kion bezonas ĉiu eklezio.

— Mi dume koleras pro la provo ŝarĝi la katolikan eklezion per supozita antiekumenismaj sintenoj.

— Mi atendas ke la venonta esperanta ekumena kongreso pritraktos tiujn temojn kaj koncedu parolon al la parto-

ESKATOLOGIA KONFERENCO

Komence de novembro 1999 okazis en Praha evangelia teologia konferenco organizita per la Evangelia Teologia Seminario kaj la Evangelika Alianco (Evangelical Alliance). La temo estis eskatologio. La ĉefa preleganto estis konata reformita teologo, Prof. D-ro Jan Milč LOCHMAN, iama profesoro pri sistema teologio en la Universitato de Bazelo kaj ĝia rektoro dum kelkaj jaroj. Eskatologia apartenas inter kristanoj al temo malfacila kaj kontroversa. En la tria tago de la konferenco aliĝis ankaŭ reprezentantoj de misiaj asocioj, kiuj ĉiujare renkontiĝas kun reprezentantoj de eklezioj kaj serĉas funkciantan modelon de kunlaboro en misifero. Eksterordinara gasto estis la nova prezidanto de la Eŭropa Evangelika Alianco, Gordon Rogers SHOWELL el Britujo.

prenantoj.

— Ja, jes... Mi volus ke oni enirus novan solidan komunan interpretadon pri la Biblio. Tiun ĉi mi vidas ĉiam pli forglitiĝi el la bazo de miaj piedoj. Mi ne plu scias kiuj estas la firmaj punktoj ĉar la novaj prihomaj kaj lingvistikaj sciencoj lasas en mia mano literaturajn tekstojn disrompitaj, el kiuj nur malmultaj certecoj rajtas deveni.

— Mi revenas al mia temo. Mi atendus, kiel ekumenan taskon, novan reprezentadon pri kristanismo en ĝiaj esencaj punktoj: mi diras prezentadon kiu ne stridu kun la moderneca pensmaniero kiu certe ne estas tute allasebla, eĉ parte ĝi devenas el la kristanismo mem. Por ekzempli, ŝokas min tiu „Dio pretendis ke al la filo riparanta la homan pekon ne estu malŝparita la kruco”, laŭ kutima esprimo plurfoje aŭdigita ankaŭ en tiuj ĉi tagoj. Por mi fariĝus pli facile kaj kredeble, kaj nestrideme, pen-

La temoj de la prelegoj estis la sekvantaj:
La tago de la Eternulo en la Malnova Testamento;

Eskatologio de la Dia Regno;
La aktiviganta forto de eskatologio en la Bohema Reformacio (LOCHMAN);

Eskatologio: fonto de espero kaj enradikiĝo de la kristana vivo (LOCHMAN);

Hermeneŭtiko de eskatologiaj tekstoj;
Perspektivo de misio en Eŭropa kunteksto: ĉu ekzistas espero por Eŭropo? (SHOWELL).

Parto de la konferenco estis seminario, diskutoj kun temoj: Kiel taksu signojn de nia tempo? Kiel prediki ekstaologiajn tekstojn de la Biblio?

Josef POKORNÝ

si ke la Filo — jam vera homo — sekvis sian konsciencan kiu diras al li ke mem li devas ami Dion (la Patron) super ĉio. Tiel farinte, li sin kondukis kiel devas sin konduki ĉiu homo — savitaj certe la diferencoj — kaj la Patro nenion povis ol esti en konsento kun la Filo ĉar ĝuste li scias ke... mem estas la nepra nesuperebla valoro. El tio oni vidas, ke la bibliaj esprimoj, laŭ kiuj Dio ne pardonis al sia filo ricevas malstridan akcepton. Tia ne pardoni egalvaloras dispensi: ĉu Dio povis dispensi la filon de la devo plenumi konsciencajn devojn? Ne certe!

Mi volus konsiderigi, ĉe vi, aliajn stridaĵojn, sugestas la pli rezistanta al dormo,... sed ili ne plu stridas ĉe vi, ĉar kiu el vi ne dormetas, tiu ĉi jam tute dormas. Ekumenecajn sonĝojn!...

Seninvente resumis

Armando ZECCHIN

GRAVA REVUO ELIRAS EL LA KRIZO

Aperis la unua numero de LPLP (Language Problems and Language Planning) de la jaro 2001 (volumo 25). La tri ĉefaj artikoloj, ĉiuj en la angla lingvo kun esperantlingva resumo, traktas la jenajn temojn:

„Tutmonda angla lingvo kaj loka lingvopolitiko: Kion bezonas Danlando” de Robert PHILLIPSON;

„De lingva liberalismo al jara reguligo: La greka lingvo en Cipro” de Marilena KARYOLEMOU;

„Antaŭenigi lingvan diversecon en multlingvaj medioj: Politiko kaj realo en Sudafriko post Rasapartigo” de Timothy REAGAN.

En la interlingvistika sekcio de la revuo aperas artikolo en la itala de Maria Antonietta PINTO kaj Renato CORSETTI, „Prilingvaj sekvoj al la gepatra lingvo de la lernantoj pro instruado de Esperanto: sperto en itala mezgrada lernejo”.

Aperas naŭ recenzoj, en la angla, franca kaj itala lingvoj, pri novaj libroj, inkluzive la redaktitan volumon de John BOLI kaj George M. THOMAS, „Constructing World Culture”, kiu enhavas i.a. (anglalingvan) ĉapitron pri „Konstruado de tergloba identeco: la rolo de Esperanto”, de Young S. KIM. Recenzas Mark FETTES.

Iom post iom la revuo regajnas sian eldonritmon, post la redakta krizo de la pasinta jaro, sed ĝi ankoraŭ malfruas kelkajn monatojn. La revuo estas eldonata sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvo-problemoj (CED). La eldonisto estas John Benjamins Publishing Company, Amsterdamo. Detalojn pri abonado kaj resumojn de la artikoloj vi trovos ĉe <www.benjamins.com>.

Humphrey TONKIN

Heroldo komunikas

JARDEKO POR KULTURO DE PACO

Sekve de la subskribo de la partenerkontrakto inter UEA kaj Unesko pri la „Jardeko por Antaŭenigo de Kulturo de Paco kaj Neperforto profite al Infanoj 2001–2010”, ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj ligitaj al UEA rajtas listigisian hejmpaĝon en la spacon de UEA en la TTT-paĝaro de Unesko. En tiu spaco, poste, eblos enmeti informojn pri la agadoj ligitaj al la jardeko, kiujn oni organizos en la unuopaj landoj.

Por esti ligitaj al la TTT-paĝaro de Unesko, vi devas esti rajtigataj pere de kodvorto, kaj vi estos respondecaj pri eventualaj misuzoj.

Interkonsentu pri via eventuala ligo kun Vincent CHARLOT <esperant@freesurf.fr.>

Praktikaj informoj:

Ni bezonas por enskribi vian TTT-adreson la jenajn informojn:

Nomo de la asocio

Nomo de la kontaktoto (estus bone prezidanto aŭ sekretario)

Funkcio de la kontaktoto

Adreso: telefonnumero

faksnúmero

retadreso

TTT-ejo

Ni tre dankas vin anticipe,

Renato CORSETTI

Colle Rasto, prima strada, 3

IT-00036 Palestrina, Italujo

<renato.corsetti@esperanto.org>

kaj

Vincent CHARLOT

10, Sq.Savorgnan de Brazza 94310 Orly

tel: 33 (0)1 48 92 63 79

<esperant@freesurf.fr>

INTERNACIA FOTOKONKURSO

Post la sukcesaj konkursoj en 1998, 1999 kaj 2000 la redakcio de „La Ondo de Esperanto” invitas al partopreno en la kvara Internacia Fotokonkurso.

La konkurso ne estas ligita al deviga temo.

En la konkurso rajtas partopreni ĉiu deziranta fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 10 x 15 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj komputil-rete ne estas akceptataj.

La konkursajn fotojn bonvolu sendi unuekzemplere al „La Ondo de Esperanto” (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando). La fotoj devos atingi la indikitan adreson antaŭ la 15a de decembro 2001.

La konkursajoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti enmetita slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga.

En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj, kiuj jam estis premiitaj aŭ publikigitaj. Tripersona juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1a premio: du minimumaj ruslandaj monataj salajroj kaj abono al „La Ondo de Esperanto”;

2a premio: unu minimuma ruslanda monata salajro kaj abono al „La Ondo de Esperanto”;

3a premio: abono al „La Ondo de

Esperanto”.

Specialan premion (libroj de „Sezonoj” kontraŭ ekvivalento de unu minimuma ruslanda salajro) ricevos la plej bona foto teme ligita kun Esperanto.

Ĉiu premiito ricevos diplomon.

La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2003 aperigi la ricevitajn fotojn en paperaj kaj elektronikaj eldonaĵoj kaj en ekspozicioj.

Sukcesojn!

RU-236039 Kaliningrad,
ab. ja. 1248, Ruslando
sezonoj@yahoo.com
sezonoj@yandex.ru
<http://www.sezonoj.itgo.com>

GREZILJONO SERĈAS VOLONTULOJN

Kulturdomo Kastelo Gresillon (Francio) serĉas laboremulojn por la venonta somera programo.

Estos bonvenaj: kursgvidantoj; prelegantoj; respondeculoj por studperiodoj (akcepto de staĝanoj, librotenado); helpantoj pri mastrumado.

Greziljono ne pagas salajron kaj ne repagas veturkostojn, sed proponas rabaton aŭ senpagan restadon (laŭ ple-numitaj taskoj).

Informas: „kastelo Gresillon”
<kastelo.gresillon@free.fr>.

Heroldo komunikas

KELI**Datoj por via kalendaro kaj diversaj informoj**

Al la estraroj de IKUE kaj KELI, kaj al kelkaj aktivuloj:

Bonvolu noti en via kalendaro kaj diskonigi al konatoj aŭ interesatoj:

En la Chaux-de-Fonds okazos ekumena semajnfino pri ADORU 26-28 oktobro. Gvidos Bernhard EICHKORN kaj Adolf BURKHARDT.

La regula monata ekumena Diservo en Stuttgart, laŭ decido farita pasintan sabaton post la septembra Diservo (kiun partoprenis i.a. Alois EDER, Albrecht KRONENBERGER, celebranto; Adolf BURKHARDT, predikanto; Ulrike TREUSCH; Grete BURKHARDT, Willi SCHÄFER, la kapitano; Karl Heinz SCHAEFFER; Helga WINDISCH-CZERN-TERPITZ), en oktobro kaj novembro okazos en alia loko kaj horo:

– 13 oktobro 18 h (ne 14.30) en la katolika preĝejo St. Nikolaus von der Flühe (anstataŭ en la praktolika preĝejo St. Katharina), pro la samtaga BAVELO-tago (Baden-Virtemberga E-Ligo).

– 17 novembro 15.30 h (ne 14.30) en Kloster Kirchberg apud Sulz am Neckar, laŭ sugesto de Karl Heinz SCHAEFFER. Kialo: de 16 ĝis 18 novembro, tie kunsidos la redakcia teamo de ADORU por konsiliĝi pri la sekvaj paŝoj. I.a. ni planas transdoni omaĝan ekzempleron al la spirita estro de Kloster Kirchberg, evangelia spirita centro, en kies muroj ofte laboris la ADORU-teamo.

„La sekvonta KELI-kongreso en Berekfűrdő, Hungario, povus okazi en la unua semajno de aŭgusto, de la 3 ĝis la 10, 2002. Detalojn kaj aliĝilojn ni sen-

dos baldaŭ. Tutkore salutas Vin, Éva FARKAS-TATÁR (Zoltán SOMHEGYI)”. Al tiu cito el la mesaĝo el Hungario mi aldonas la peton, ke la estraranoj de KELI signalu sian konsenton aŭ per mesaĝo aŭ per silento — kiu ne reagis alimaniere ĝis la 15a de oktobro, konsentis. — Temas pri la sama semajno kiel la UK en Brazilo. Do, male ol en Zagreb, oni ne povas ĉeesti en ambaŭ eventoj.

Progresas la laboroj por represi la Biblion, kun la dua-kanonaj libroj. Post stagno plurjara, kiam ne ŝajnis urĝa la represio, ĉar ekzistis stoko, nun montriĝis, ke necesas rapide agi: ĉe UEA la Biblio estas elĉerpita; ĉu iu libroservo aŭ individuo ankoraŭ posedas stokon (mi mem havas kelkajn, kiujn mi aĉetis de David por simila okazo, do unuopajn mendojn mi povas plenumi). Gerrit BERVELING intertempe eldonis la unuan parton de la traduko de la dua-kanonaj libroj ĉe FONTO en Brazilo, kun tre instrua enkonduko kaj abundaj notoj kaj klarigoj, sed tio ne anstataŭas la tekston sen notoj en la simpla kutima biblia formo. La formatingo okazis fare de neesperantista brita amiko de David. Gerrit deklaris sin preta refoje kontroli la nunan formaton.

Ulrike TREUSCH, vikariino de la Virtemberga Evangelia Eklezio, kiu ĉeestis la ekumenan kongreson en Zagreb, akiris postenon de asistento en la evangelia teologia fakultato de la universitato de Tübingen. Ni gratulas kaj kunĝojas. Ŝi jam de kelka tempo laboras super disertacio por akiri la gradon de teologia doktoro. En Stuttgart ŝi plurfoje estis lektoro en la ekumena Diservo.

Surpriza konstato: homoj ekster Esperantujo trovas intereson pri ADORU — pro la ekumena, internacia, muzika karaktero. Lernejoj, muzikistoj,

Saluton.

Leland Bryant ROSS, usona esperantisto kiu loĝas en la urbo Seattle, Washington, Usono (kaj kiu kontribuis kelkajn tradukojn al la nova kantlibro „Adoru”) petis al mi ke mi informu al KELI kaj IKUE pri la enretigo de himnoj ĉe tiuj ĉi adresoj:

<http://www.geocities.com/cigneto/thctxt/h/hodiomank1.html> kaj

<http://www.geocities.com/cigneto/thctxt/s/seviolent1.html>

junulargvidantoj aĉetis. Kiu mem faros provon, montrante la libron kaj sugestante akiri ĝin? El si mem, neniun mendos ĝin, sed se ni — vi kaj mi — varbe montros, eble jes. Dum multaj jaroj, ni ne disponis simile belan Kristnaskan donacon por Esperanto-amiko. Frue pripensu tion! Pastro EICHKORN faris simplan varbilon/mendilon, kiun oni povas aldoni al letero sen kroma afranko-kosto. Mi mem ne plu forsendas leteron sen tiu folio, egale al kiu. Mi invitas imitantojn — ni ne havas budĝeton por startigi reklaman kampanjon, sed tiamaniere multaj povus kunhelpi. Petu la foliojn ĉe pastro EICHKORN en Villingen. — Unu kritiko venis, ke la folio ne surhavas la ISBN-numeron de ADORU. Jen la numero: ISBN 3-9803793-5-3 (Inter ni: tiu numero tamen nur escepte servu por mendo: ĝia signifo estas multe pli por levi la prestiĝon kaj indiki seriozecon — plej utile kaj tempoŝpare — kaj kosto-ŝpare — estas mendi tie kie la libroj sidas, nome ĉe pastro EICHKORN, Romäusring 20 en DE-78050 VS-Villingen).

Adolf BURKHARDT

kaj pri la 300-a himnoteksto en TTT-Himnaro Cigneto, nome:

<http://www.geocities.com/cigneto/thctxt/k/kunamazori1.html>

Temas pri sufiĉe granda projekto kiu inkluzivas tradukojn, informojn, kaj eĉ melodiojn laŭ la MIDI-formato.

Ĉu ekzistas perreta dissendolisto de KELI-anoj, per kiu oni povas disdoni tiajn informojn? Kaj ĉu vi povas trovi lokon en Dia Regno por tia anonco?

Koran Dankon.

Lee MILLER

Columbia, Missouri, Usono

La decida horo

Jen iu Fremdulo, mia animo,
nun staranta kiel milita viktimo
ĉe l'enirejo de via koro.
En tiu ĉi via decida horo,
ĉu vi enlasos Lin?

Li ja eligos vian koran ŝtonon
kaj anstataŭ tio donos koron karnan.
Per sia lumo Li briligos ĝin
kaj mem komencos loĝi ĉe ĝia sin',
se vi enlasos Lin.

Vian aprobon Li celas akiri
kvazaŭ Li ne rajtas senpete eniri;
Jesu! Tiun ĉi horon decidan,
Kaj vi ricevos Lian tuŝon mildan,
se vi enlasos Lin.

Olúwábùnmi Gabriel ÒSHÓ-DAVIES
(18/04/1997)

El Kongia Demokratia Respubliko

Agadraporto de KEKO dum la periodo iran-ta de septembro 2000 ĝis junio 2001.

Ni ĝojas skribi al vi tiun raporton por signifi nian silenton kaj nian foreston en la movado. La sola kialo estis ke, la gravuloj okupiĝis pri teologiaj kaj bibliaj studoj dum tri jaroj (1997-2000). Do neniun povis okupiĝi pri la movado. Depost la fino de la studado, ni rekomencis la agadon, pri kiu ni sendas al vi la raporton malgraŭ la malfrueco.

1. KUNVENOJ: — Ni kunvenis kadre de la jarkunveno de DKEA dum decembro — la estraro kunvenis kvin foje.

2. MEMBROJ: — Estraro 4 personoj
— Membroj 15 personoj
— Muzikantoj 10 personoj
— Handikapuloj 10 personoj
Tuto 39 personoj.

3. INSTRUADO: Ni organizis kursojn por kristanoj ne esperantistoj.

4. FINANCOJ: Kotizoj 3000 FC
Donacoj 1500 FC
Tuto 4500 FC

Elspezoj
Materialoj 1600 FC
Transporto 500 FC
Konsekro de la pastoro 2000 FC
Tuto 4100 FC
Saldo 400 FC

5. PROJEKTO: Por 2001: — starigo de oficejo

— plibonigo de Instruado
— la retadreso
— telefonaparatoj porteblaj

6. SUGESTOJ: — Subteno de KELI per subvencio

— Revuo Dia Regno
— Partopreno de la membroj en la kongreso de KELI.

7. LA ESTRARO:
Prezidanto — Pastoro Leonardo MATONDO

Sekretario: J.P. LUNGKISA
Kasisto: Pastoro WELA
Ĉefa konsilanto: Mungulu MUPUNGU

Por la estraro
Leonardo MATONDO prezidanto.

Krucvortenigmo

1	2		3	4	5		6
7			8				
		9				10	
11	12				13		
14				15			
16			17				
		18				19	
20							

Kromsolvo

10	2	12	17	4	6
----	---	----	----	---	---

horizontale: 1. homo, kiu dogmon, 7. prepozicio kontraŭas religian de direkto, 8. part' de diservo ĉe la 15a, 9. tre sune, 11. difinita kvanto, 13. sidil' sur rajdbesto, 14. rusa regnestr', 15. prefikso signifanta fiŝon, 16. suferloko de la kondamnitaj animoj, 18. inkline, 19. komenciĝanta prefikso, 20. gaso en aero.

vertikale: 1. erara percepto de neekstanta objekto, 2. prepozicio, 3. malagrabra impresado de seninteresiĝo, 4. ĉirkaŭig' de talio, 5. organizo de Unuigintaj Nacioj, 6. kvarangula pinta monumento, 9. glitas per tabulo sur marondoj, 10. deviga juda loĝkvartalo, 12. malgrandegul', 15. kur', 17. ŝati, 19. prepozicio loka,

kromsolvo: La unua libro de la Biblio.
Fritz LAUTENBACH

Solvo de la vortserĉludo (829)

horizontale: Getsemano, Kanaano, Babelo, Bet-Leĥem, Jerusalemo.

vertikale: Golgoto, Efezo, Jeriĥo.
diagonale: Nazareto, Kapernaumo

MI ESTAS ŜAFO EN ŜAFARO (MONOLOGO)

Mi estas ŝafo en ŝafaro kaj mi estas tre ĝoja kun la pastoro (= paŝtisto), kiun Dio donis al mi. Jes mia pastoro irigas min, kie estas bonaj paŝtejoj. Li amas min. Sed bone, kiam mi faras malbonajn aferojn, li riproĉas min, sed li faras tion por plibonigi min, ĉu vi scias? Kiun Dio amas, tiun ankaŭ Dio disciplinas por ke tiu ne lasu la bonan vojton.

Mia pastoro multe laboras, kaj mi devas respekti lin. Sed bone, io ĝojigas min, ke li ne laboras sola. Kiel Moseo delegis iujn homojn por ke li gvidu bone la Dian popolon. Mia pastoro donas laboron al iuj inter ni, al iuj kiuj deziras labori kompreneble kaj tiel li povas ripozi dum iom da tempo. Jes ĉar la vivo de mia pastoro ne estas facila, ĉiam en lia domo estas multaj homoj. Li gastigas aŭ konsilas ilin. Multfoje mi demandas min: Kiom da tempo havas mia pastoro por paroli kun sia familio? Kiom da tempo li havas por siaj infanoj? La vivo de pastoro ne estas facila. Multaj homoj kiuj iras al lia domo por ricevi ion, sed malmultaj iras por demandi: Kiel vi fartas? aŭ por doni ion. Ofte ni forgasas ke ankaŭ pastoro estas homo, ke li estas karna kaj osta kiel ni, ke se iu pikas lin, li elverŝas sangon, ke li bezonas

aŭdi: „Mi amas vin, miaj manoj estas viaj, mi estas ĉi tie por ĉirkaŭbraki vin”.

Mi estas ŝafo en ŝafaro kaj mi estas tre ĝoja kun la pastoro kiun Dio donis al mi. Li ne estas perfektulo. Sed bone, ankaŭ mi ne estas perfektulo. Kiam Kristo la Bona Paŝtisto alvenos, vi kaj via pastoro kune estos ŝafetoj. Tiam vi vidus ke viaj ostoj kaj la ostoj de via pastoro estas samaj. Tiam vi amos pli vian pastoron ol nuntempe sed kial atendi tion da tempo: faru tion nun, mi invitas vin.

Yoan Francisco CUEVAS PÉREZ
(Kubo)



Peto el Kubo pri Arto por Dio

S—ro Yoan Francisco Cuevas Pérez laboras por Dio per arto: „La arto por Dio”. Li bezonas helpon de gefratoj por obteni materialojn, librojn, konsilojn, artefaritajn hararojn, bestaĵojn. Li deziras interŝanĝi ideojn kaj skribaĵojn kun aliaj kristanoj, kiuj laboras ankaŭ pri la Arto por Dio.

Skribu aŭ sendu vian helpon al:

„La arto por Dio”

S—ro Yoan Fco. Cuevas Pérez
Apartado 65, Sancti Spiritus 2
60200 Kubo (Cuba)

Por esti uzablaj, la materialoj devas esti aŭ en Esperanto, aŭ en la hispana, aŭ en la angla.

Dio estas amo.

Yoan kaj Yudeimy



foto: Softkey